POLA ESPERANTISTO

Monata Organo de Polaj Esperantistaj Societoj.

ESPERANTYSTA POLSKI

Organ Towarzystw Esperantystów Polskich.

Novembro, 1908. Jaro I (III). № 11.

Redakcia Komitato: Komitet Redakcyjny:

Redakt. D-r Leon Zamenhof

Dr. K. Bein (Kabe) Ks. Prof. A. Dąbrowski
Leo Belmont Antoni Grabowski
A. B. Brzostowski A. Zakrzewski

Al la Komitato helpas per siaj konsiloj la Aŭtoro de Esperanto

D-r Ludwik Zamenhof.

ENHAVO:

„Aleksander Świętochowski", de L. Belmont. — El „Aspazio", de A. Świętochowski, trad. D-ro L. Zamenhof.— Eĥoj el la kongreso.—„El la filozofio de bestoj", trad. H. Hempel. — Poezio. — Humoraĵoj — „Ĉu li" de d-ro Valienne. — Kroniko. — Bibliografio.

TREŚĆ:

„Aleksander Świętochowski", przez L. Belmonta.— Z „Aspazji", Świętochowskiego, tłóm. dr. Leon Zamenhof.—Echa z kongresu.—„Z filozofji zwierząt", tłóm. p-i H. Hempel. — Poezje. — „Ĉu li", d-ra Vallienne. — Kronika. — Bibliografja.

Adreso de la Redakcio: WARSZAWA, (Varsovio) Marszałkowska 143.

Abonprezo — Prenumerata

Jare — rocznie: 2 rb.=5 fr.=4 mrk. kun transsendo kaj aldono literatura. z przesyłką i dodatkiem literackim.

Adreso de la Administr.: WARSZAWA, (Varsovio) Hoża № 20, m. 12.

Aparta numero kostas sen aldono 15 kop. — Oddzielny numer bez dodatku 15 kop.

F. Kozłowski OBECNIE S. NOWACKI

Warszawa, Rymarska 7, róg Leszna. — Telefon 39-99.

NAJTAŃSZE ŹRÓDŁO: Lamp, Porcelany, Fajansu, Szkła, Galanteryi, Noży, Widelcy etc., etc. Wynajmuje nakrycia stołowe, platery, bieliznę, krzesła, stoły.

ŻYRANDOLE kościelne i salonowe do świec i gazu. Wielki wybór. Najniższe ceny. Reperacye i odnawianie żyrandoli.

W wielkim wyborze pryzmy kryształowe do żyrandoli. Jedyny palnik naftowo-żarowy bez wszelkich komplikacyi 60% oszczędności nafty. Komplet rub. 3.

ZAKŁAD BRONZOWNICZY

W. Komorowski i S-ka

WARSZAWA

Nowy-Świat № 12.—Telefon № 188-82.

Wykonywa do elektryczności: Żyrandole, lampy, pendle plafoniery i t. d. — Cenniki illustrowane na żądanie.

Fabryka i Magazyn

J. Kuczmierowski

Warszawa, Marszałkowska 108.

Poleca: Siodła, zaprzęgi, przybory podróżne, oraz galanterję skórzaną w wielkim wyborze.

Cenniki na żądanie.

SKŁAD MEBLI

Majstrów Stolarskich

Jana Berezińskiego

w Warszawie, ul. Królewska 6.

wprost Mazowieckiej.

ROBOTY TAPICERSKIE

Dekoracye stylowe i fantazyjne.

Telefon 51-52.

„MODERNE" Wyborne MYDŁO

F. PULS.

TOW. AKC. w WARSZAWIE

DOSTAĆ MOŻNA WE WSZYSTKICH LEPSZYCH PERFUMERJACH.

„ŚWIAT"

TYGODNIK LITERACKI ILUSTROWANY POD REDAKCJĄ STEFANA KRZYWOSZEWSKIEGO.

Adres Redakcji i Administracji: Warszawa, Aleje Jerozolimskie 49.

Przedpłata „Świata" wynosi: w Warszawie rocznie rb. 8, półrocznie rb. 4, kwartalnie rb. 2, na prowincji rocznie rb. 9, półrocznie rb. 4.50, kwartalnie rb. 2.25, zagranicą rocznie rb. 12, półrocznie rb. 6, kwartalnie rb. 3.

MAGAZYN

Optyczno-Elektrotechniczny

F. Czerwiński & Co

WARSZAWA

Krakow.-Przedmieście 37.

Biuro Nauczycielskie

K. Wasilewskiego

Marszałkowska 123.

Rekomenduje nauczycieli, nauczycielki i bony różnych narodowości.

Skład Papieru

R. KRUPECKI

WARSZAWA,

Wierzbowa № 1.—Telefon 10-16.

POLECA: Materyały piśmienne i rysunkowe. Księgi buchalteryjne i t. p. Dostawa do biur i kantorów.

!!! GRAVA !!!

DEZIRANTE ELDONI EN LA FINO DE TIU ĈI JARO STATISTIKAN JARLIBRON DE ĈIUJ POLAJ ESPERANTAJ SOCIETOJ KAJ ESPERANTISTOJ EN POLUJO, NI PETAS KIEL EBLE PLEJ BALDAŬ SENDI DETALAJN SCIIGOJN PRI ĈI TIO AL LA REDAKCIO, STR. MARSZAŁKOWSKA № 143. NE PROKRASTU LA SENDON DE TIUJ ĈI GRAVAJ POR NIA MOVADO EN POLUJO INFORMOJ!

Nomaro de Polaj Esperantistoj (DAŬRIGO).

Gruszczyński Jan. poŝtestro, Uście Zielone, Galicio.
Helman D-ro Daniel, Łódź, Mikołajewska 4, kuracisto.
Kleczyński Mieczysław, Szepetówka, gub. Wołyńska, rafinisto de sukero.
Krzyżanowski Georgo, elektroteknikisto - kinematografisto, Białystok.
Malinowski Stanisław, st. Chęciny, de fervojo Nadwiślańska, gub. Kielecka.
Malinowska Marja, filino de „altkomisiisto de financa gvardio", Oświęcim II.
Margulius Stanisław, Łódź, Średnia str. № 40, ĉe Feldmark, lernanto.
Nowacki Konstanty, Uladówka, (suker-fabriko).
Pfeiffer Włodzimierz, Łódź, Librejo de L. Fiszer.
Pietrzak Klemens, sukerfabriko, Mircze, p. Hrubieszów, gub. Lubelska.
Ślężak Roman, fabriklaboristo, Łódź, str. Zakątna 45.
Zalcman Maurycy, Łódź, str. Widzewska № 151, lernanto, dez. koresp.

DĄBROWA GÓRNICZA.

Bednarski Henryk, Dąbrowa Górnicza.
Kroban Stefan, Dąbrowa Górnicza.
Stacha Piotr, Dąbrowa Górnicza.
Servant Joseph, Dąbrowa Górnicza.

Lista Członków P. T .E. — Nomaro de la membroj de la P. E. S.

(Daŭrigo).

Oberman Joel, Bonifraterska 17—4.
Ochorowicz Wacław, Sienna 8—13.
Orsetti Marja, Göttingen, Nicolaüsburger Weg. 55.
Perkal Rubin, Kupiecka 3—8.
Pestkowski Leon, Wronia 12.
Przesmycki Władysław, Turczyn, Wołyńska gub.
Pszczółkowski Adam, Smolna 38—15.
Rabinowicz H., Złota 25—3.
Replański Izaak, Nalewki 21.
Rosenbaum Dawid, Praga, Brukowa 30.
Róziewicz Eda, Czerniakowska 12.
Rudnicki Edward, Marszałkowska 72 14.
Silberbogen Norbert, Prosta 8.
Silberbogen Salomea, Prosta 8.
Skalski Edward, Krochmalna 30—13.
Słowikowski Romuald, Waliców 25—19.
Sulecki Bolesław, plac Witkowskiego 10.
Świder Michał, Dzika 15.
Türk Juljusz, Widok 21.
Türk Anna, Widok 21.
Urban Feliks, Królewska 20.
Wandel Leon, Przejazd 9—32.
Węgliński Stefan, Kijów, Prorieznaja 3.
Wilke Janina, Hoża 20—12.
Wojciechowski Michał, Będzin.
Zaczyński W., Leszno 88.
Zambrzycki Aloizy, Mokotów, Nowoaleksandr. 37.

(*Daŭrigo sekvos*).

S-ro **A. N. VASILJEV, Voroneĵ (gub.).**

Esperanto poŝt: kartojn Oficejo. — Invitas polajn esperantistojn interŝanĝi p.-k.; deziras ricevi kun portetoj (kaj grupoj) de famaj poloj: reĝoj, literaturistoj, sciencistoj, pentrartistoj, muzikverkistoj, politikistoj, esperantistoj kaj t. p.

AVIZOJ

ZARZĄD POLSKIEGO TOW. ESPERANTYSTÓW zawiadamia, że organizuje się przy Towarzystwie **Sekcja handlowa.** Członkowie Towarzystwa—handlowcy, życzący sobie należeć do sekcji, proszeni są o zapisywanie się w kancelarji Tow.; o terminie organizacyjnego zebrania Sekcji będzie osobne zawiadomienie.

ZARZĄD POLSKIEGO TOW. ESPERANTYSTÓW zwraca się niniejszym do prowincjonalnych esperantystów z prośbą o otwieranie **oddziałów prowincjonalnych,** mających ogromne znaczenie w sprawie rozwoju i propagandy języka Esperanto. Zarząd bierze na siebie załatwianie potrzebnych formalności. Z odpowiedniemi zgłoszeniami upraszamy zwracać się do Sekretarjatu, Zgoda 4.

SPIS DELEGATÓW UNIWERSALNEGO ZWIĄZKU ESPER. w całym świecie na rok 1908 wyszedł z druku i jest do nabycia w kancelarji Tow. Zgoda 4, od 8—9 wiecz. Cena kop. 16.

ZARZĄD POLSKIEGO TOW. ESPERANTYSTÓW zawiadamia, że co **Czwartek** odbywać się będą w lokalu Towarzystwa (Zgoda 4) **wieczory towarzyskie,** na których będą urządzane głośne czytania, deklamacje i t. p.

WE WTORKI I SOBOTY odbywać się będą równoległe **dwa kursy** języka Espetanto (kurs wyższy i niższy). Obecnie przyjmują się zapisy na kurs niższy, który rozpocznie się w początku Listopada. Informacje w kancelarji Towarzystwa codziennie od 8—9 wiecz. (telefon 127-24).

W PIERWSY PONIEDZIAŁEK KAŻDEGO MIESIĄCA odbywać się będą, jak dawniej **zebrania miesięczne** w lokalu „Uranji" — (Bracka 18) dla członków Towarzystwa i wprowadzonych gości.

Od Administracji

Do numeru niniejszego załącza się dodatek literacki (№ № 10, 11 i 12) **„Kio estis foje en Sidono".**

Uprasza się półrocznych prenumeratorów o odnowienie prenumeraty za II półrocze.

POLA ESPERANTISTO

Monata Organo de Polaj Esperantistaj Societoj



ESPERANTYSTA POLSKI



Organ Towarzystw Esperantystów Polskich

Novembro, 1908. | WARSZAWA — VARSOVIO. | Jaro I (III). № 11.

ALEKSANDER ŚWIĘTOCHOWSKI.

ALEKSANDER SVJENTOĤOVSKI.

(Okaze de lia 40-jara literatura jubileo),

Ĉi tiu pola verkisto povas kaj devas interesi esperantistojn.

Ne nur pro tio, ke li estis eble unua pola redaktoro, kiu en la naskiĝa horo de Esperanto, ĉirkaŭita ĉie de frosta atmosfero de mokadoj aŭ silentado, donis en sia gazeto lokon al artikolo, antaŭvidinta venkon de „Lingvo internacia“ *); ke li estis unu el la tri esceptaj redaktoroj **), kiuj ne montris skeptikan dorson al la lingvo artefarita; ke li estis preskaŭ sola, kiu de tempo al tempo donis informojn pri la progreso de nia afero.

Li interesas nin pro la spirito de sia kvardekjara literatura laboro, kiu nun donis okazon por publika jubilea festo..., malpermesita de la registaro en la lasta horo.

Świętochowski, la aŭtoro de l' dramo „Aspazio“, eliranta nun en esperanta traduko de s-ro Leono Zamenhof, ne povas esti fremda al diversnaciaj esperantistoj, kiuj ĵus aplaŭdis fervore en la kvara esperantista kongreso la profetajn vortojn pri la idealo de internaciismo.

Ĉar li mem dum sia longa krea laborado estis apostolo de vera internaciismo, tio estas: ama alproksimiĝo de ĉiuj popoloj kaj kunplektiĝo de plej sanktaj idealoj de diversnaciaj genioj en unu komunan sunon, solan, potencan kaj belegan harmonion, en kiu malaperas nenia tono aparta kaj valora.

Tiun-ĉi poeton-saĝulon, kiu kunigis noblan amon al progreso de l' patrujo kun varma amo al progreso de l' homaro, multaj samlandanoj persekutis longajn jarojn kvazaŭ malvarman egoiston kaj mokindan kosmopoliton.

Ĉirkaŭ ĉiu eminenta homo naskiĝas legendoj. Tial ĉirkaŭ Świętochowski ankaŭ naskiĝis legendo, ke li ĉion „surkraĉis, piedebatis, malhonoris“.

Ripetadis ĉi tiun legendon en mallumo de nia vivo per bruo de siaj flugiloj niaj hejmaj vespertoj.

Ĉion surkraĉis, piedebatis, malhonor-

*) La unua artikolo de L. Belmont aperis en „Prawda" (Vero) en Marto j. 1888; poste aperis ankaŭ artikoloj de s-ro A. B. Brzostowski.

**) Świętochowski, Pług, Chmielowski (Ateneum) Aŭgusto 1888. Artikolo de L. Belmont pri „Lingvoj naturaj kaj artefaritaj".

is la homo, kiu kvardek jarojn almetadis fajran feron al la frunto de ĉiuspeca malnobleco!

Jes!... ĉar li estis persona malamiko de hipokriteco. Li ĵetadis sur ĝian vizaĝon feran ganton. Kaj sur tiu ĉi vizaĝo diskrevadis masko — kaj aperadis malkaŝita, malbelega kaj malnobla mieno... La hipokriteco ne povis tion ĉi permesi kaj kreadis legendon, ke Świętochowski ĉion malhonoris, piedebatis, surkraĉis...

Sed tiaj spiritoj kaj majstroj de sia tempo, al kiuj apartenas Świętochowski, venkas eĉ tiam, kiam ili estas plej forte persekutataj. Ĉar ili ĉiam iras supren. Kaj persekutantoj, ilin postkurantaj, devigataj estas ĉiam iri post ili — ankaŭ supren.

Kio do malutilas, ke la persekutantoj ne ellasas el siaj manoj ŝtonojn kaj kotbulojn, se ili devigataj estas supreniri kaj kontraŭ si mem ekvidi pli larĝajn perspektivojn?

Nun ni estas malproksimaj de tiuj tempoj, kiam en nia gazetaro konservativa Renan ŝajnis besto apokalipsa, Voltaire estis nur malnoblulo, kiu vane petegis pastron en sia agonio, Spencer estis malklerulo kaj Darvin—malbelulo, alskribanta al bonaj homoj sian propran devenon de simio!

Kaj por ĉi tiu ŝanĝo de tempoj ni devas grandaparte danki la publiciston Świętochowski, ĉar li estis tiu, kiu portis standardon en la unua vico kaj tiu, kiu per sia temperamento fajrigis junajn batalantojn de progreso kaj tiu, kiu lumigis vojon per fulmoj de sia stilo.

Se publicisto Świętochowski, estro de pola progreso dum kvardek jaroj, ne povas pli proksime interesi alinaciajn esperantistojn, do mi ne vidas en la pola literaturo alian verkiston, kiu per sia komunehoma penso kaj tutmondaj idealoj estus pli konvena por prezentado al esperantistaro, ol la aŭtoro de l' Aspazio.

Tial mi estas tre kontenta, ke s-ro Leono Zamenhof decidis konigi dramaŭtoron Świętochowski al la esperanta publiko kaj elektis por tiu ĉi celo Aspazion.

En tiun ĉi dramon la kreinto enmetis tutan sian amon, ĉiujn sonĝojn pri idealo, ĉiujn batalojn de eterna revolucia spirito, tutan sian amon al beleco, kaj malamon al malnobleco. Ĉi tiu dramo estas vere kreita de spirito de unu el elektitaj filoj de Prometeo!

Leo Belmont.

EL „ASPAZIO".

Kvinakta tragedio de A. Świętochowski.

La defendo de Aspazio.

PERIKLO.

Ekstaris antaŭ mi grandega monto da ofendoj kaj mensogoj, kiun rapideme kaj diligente konstruis langoj de furioziĝinta malico kaj kiu devas dispremi mian amatan edzinon. Ĉu mi povas tutan tiun ĉi monton disĵeti, pesi en ĝi antaŭ vi ĉiun ŝtonon de kondamno, ĉiun bulon da kalumnia koto, ĉiun plenmanon da sablo ĵetita sur viajn okulojn, por ke vi ne rimarku la veron? Se eĉ permesus al mi tion ĉi la doloro, ĝin ne permesas la abomeno. Ĉiu el vi sendube trovis sin iam antaŭ kontraŭ-

ulo, kiun li estus renversinta per unu piedekbato kaj tamen ne volis lin eĉ piedekbati; ĉiu renkontiĝis kun kulpigado, kiun li senpene estus repuŝinta, sed, haltigita de abomeno, li ne repuŝis. La plej mizera homo havas konvinkon, ke lia karaktero nur ĝis ia grado povas esti duba kaj atingebla de suspektoj; sur ŝtupoj pli malaltaj li estas garantiita kontraŭ ili; se mi, regnanoj, kulpigus iun ajn el vi, je turmentado de sklavoj, la aliaj akceptus tion ĉi kiel eblan; sed, se mi kulpigus lin je formanĝado de sklavoj, neniu kredus al mi sen videblaj argumentoj. Ĉar egale ĉiu homo portas en si mezurilon de versimileco de homaj agoj, kun kies helpo li de la unua fojo taksas la honestecon de ĉiuj riproĉoj. Mi supozas, ke vi ankaŭ ĝin posedas en via konscienco, ke vi ankaŭ rimarkis mem la tutan monstrecon de la kulpigo, antaŭ ol mi sukcesis ĝin montri al vi. Efektive, kio laŭ Hermipo kaj liaj kompanianoj, aŭ ordondonantoj, estas Aspazio? Malĉasta hetero, delogantino de senpekaj knabinoj, mastrino de ametaĵoj de sia edzo, difektantino de sanktaj arbaretoj, senpensema kaj aroganta insultantino de dioj. Per multenombraj riveretoj ŝi disfluigas moralan putron sur la tero, kaj ĉar ŝi ne povas atingi kaj infekti la ĉielon, ŝi superĵetas ĝin per blasfemaĵoj. Tiu ĉi venenantino morala disvastigas ĉirkaŭ si tiel mortigan influon, ke de ĝi pereas plej geniaj mensoj kaj plej potencaj karakteroj. Konfesu, ke tiom da teruraĵoj oni povus dividi inter kelkaj virinoj kaj eĉ tiam ĉiu estus malofta siaspeca ekzemplero. Monstron kunigantan en si ĉiujn tiujn ĉi abomenindaĵojn la naturo ne kreis, naski ĝin povas nur fantazio de malnobleco. Jes, ĝi estas spirita frukto de Hermipo, jesigita, kiel efektiva, de neniu. Mi jam ne parolas pri la atestaĵoj de Sofoklo, Sokrato, Protagoro, al kiuj oni penis ŝteli el la buŝo ian dusencan vorton kaj malnoble ekuzi; sed kion pruvis aliaj atestantoj? La sklavo Trakso, videble subaĉetita, reprenis pro timo siajn vortojn; Tucidido kaj Diofito apogis sin sur miaj plej koraj forestantaj amikoj, kiuj ne povas ekstari ĉi tie kaj per neado de imputitaj al ili mensogoj ree enŝtopi ilin en la gorĝojn de la kalumniuloj. Se Aspazio tiel senkaŝe kaj ĉie dissemadis infekton moralan, kial do oni ne alkondukis ĉi tien la aregon da ŝiaj amatoj kaj oferoj; kiel oni ne kolektis la multenombran sekvantaron de tiuj morale faligitaj de ŝi knabinoj, sed oni preferis falsi la plendojn de la ekzilito kaj de la mortinto? Furioza malamo, timigita nek de majesteco de la malbonsorto, nek de l'morto, malnoble perfortis ilin ambaŭ. La koroj de miaj amikoj estis konstante malfermitaj por mi kaj mi nenion vidis en ili krom malŝato aŭ malrespekto por tiuj, kiuj nomas sin iliaj konfidenciuloj. Tucidido, kiu alvokis al juĝo Anaksagoron, estis sentaŭga, sed Tucidido, kiu malhonoras la senhejmulon, estas malnobla; Menono, kiu malgloris Fidion vivan, estis bazilisko, sed Diofito, kiu senglorigas la mortinton, estas hieno. En tiu ĉi malnobla afero partoprenis, bedaŭrinde, ankoraŭ unu homo. Mi preferus vidi antaŭ mi fantomon de patromortiginto; sed, ĉar tiu ĉi homo jam ekstaris, li atestu kontraŭ siaj gepatroj adoptintoj. Vi scias, ke de mia unua edzino mi disiĝis. Ŝi petis, ke mi lasu ĉe ŝi miajn du filojn; mi konsentis, ĉar ŝi amis ilin, mi tamen ne ĉesis atenti ilian edukadon. Malsanema, la pli juna mortis frue; la pli maljuna dume maturiĝante komencis aperigi malbonajn emojn kaj malvirtajn kutimojn, kies embrion mi ne rimarkis en lia infaneco: li drinkadis kun la riĉa junularo Atena, partoprenis en plej malĉastaj diboĉadoj. Admonojn li akceptadis de mi komence indiferente, poste arogante ĝis fine li tute rifuzis al mi la obeon kaj respekton. Longe mi ne povis trovi la fonton, el kiu li ĉerpis la rimed-

ojn por tia vivo; fine mi trovis, ke ilin liveras al li kelkaj aristokratoj, kaj precipe la edzino de ia riĉulo—kun kia celo, vi divenos el la prezentita al vi skribaĵo kaj el la intencita ĉi tie malhonorado de la patro kaj de la patrino per la atestaĵo de la filo. Mi ne alalizos tiun ĉi hontindaĵon, mi eligis ĝin nur, por ke sur ĝia fono respeguliĝu pli klare la malico de la kulpigantoj, por lumigi al vi unu detalon, antaŭ kiu eĉ la ebria kaj zorge en kalumniado ekzercita Ksantipo ektremis. Li edziĝis je virino, meritanta pli bonan sorton, kiun li malzorgis kaj kune kun la infanoj ĵetis en mizeron. Eksciinte ĉi tion, Aspazio donis al la malfeliĉa virino konstantan monhelpon, kiun ŝi ofte pagis dufoje, kiam la malŝparemulo fordrinkis ĝin, kaj pri tiu ĉi Aspazio li atestis, ke ŝi instigis al senhonesta metio lian edzinon, kiun ŝi cetere tute ne konis! Vere, la homa lango estas kapabla plenumi ankoraŭ pli grandajn krimojn, ol la mano! Tiu ĉi ekzemplo vin instruu, kiel en la laboro de niaj kulpigantoj ŝanĝiĝis la vero. Kaj kiacele oni plenumis tiun ĉi senhontan falsadon? Aspazio belega, prudenta, libera de antaŭjuĝoj, kuraĝa, agema, glora, ĉirkaŭata de filozofoj kaj de ili admirata, sendube vekis enviojn kaj malamojn; sed la fina celo de l'atako ĉi tie estas mi. Ne per simpla okazo pereis ĉiuj, kiuj staris al mi plej proksime. Unua falis Efialto, poste Anaksagoro kaj Fidio, nun venis la tempo por Aspazio. Ĉar oni ne sukcesis min dispremi, oni penis almenaŭ soligi kaj senesperigi min. La nuna ekbato, se ĝi ne maltrafos, efikos tiun tiel longe atendatan rezultaton. La kalkulo estas simpla kaj — mi konfesas — bona, ĉar Aspazio ne forisos el tiu ĉi mondo sola, sed kun Periklo, kiu ŝin amas kaj adoras, kiu sen ŝi ne povus vivi. Ĉu tia espero ne allogas! Ĉu por ĝi ne estas inde plenumi eĉ malnoblecon? Tiom da fojoj oni vane alvokis min antaŭ la juĝon de l'popolo, tiom da fojoj oni penis dispremi min per Spartana milito, tiom da kaptiloj mi evitis, tiom da ekbatoj mi rebatis kaj tiom da doloroj mi eltenis, — kaj jen ĉi tie sen ia batalo, sen kontraŭstaro mi cedos, en tombon aŭ en ekzilejon, kien vi sendos mian plej karan amikinon, al kiu mi ŝuldas la plej bonajn inspirojn kaj la plej feliĉajn ideojn. Eble mi estas cetere por vi, por la regno — baraĵo kaj ŝarĝo, kiel maljuna sklavo, kiu, fininte sian servadon, perdis la fortojn kaj estas al laboro nekapabla kaj tamen vivas obstine. Se vi serĉis okazon liberiĝi de mi, kaptu ĉi tiun—facilan kaj oportunan. Mi atendas nur ordonon, kien mi devas forporti mian kapon. Sed vi, regnanoj, ne restu kun la konvinko, ke mi foriros dispremita de malĉastaj agoj de tiu ĉi virino, se vi ŝin kondamnos. Mi foriros fiera je ŝi, kvankam ŝi antaŭ la leĝo pekis. Sur la vangoj de l'kulpigantoj trakuris, kiel mi vidas, ĝoja rideto. Jes, ŝi pekis, ĉar ŝi pensis—profunde kaj laŭte. La tradicio kaj niaj regularoj vidas en ĉi tio pli grandan pekon ol en subjetado de l'infanoj. La tuta saĝeco de niaj virinaj idealoj enfermiĝas en divenado, ekscitado kaj satigado de viraj voluptoj. Se iu varmigus ŝtonan statuon kaj instruus ĝin moviĝi, sendube ĝi trovos amanton. Plej bongusta frandaĵo por postulemaj moralistoj estas belega, odora korpo de malsaĝa virino. La prudento laŭ ilia opinio estas nur maldolĉaĵo en tiu ĉi plej dolĉa frukto sur la tero. Se la antikva kaj ĝis nun ne forigita leĝo punas per cent drakmoj virinon, kiu eliris sen vizaĝkovrilo; se estas al ŝi malpermesite aŭskulti en la teatro komediojn; se unu greka verkisto gloras tion, ke neniu en Atenoj manĝas kun fremda edzino: se la konata aristokratino fieris antaŭ mi, ke ŝiaj filinoj ne legis eĉ unu verson de Homero, tiam efektive pekis Aspazio, kiu malkorvadis sian vizaĝon

sur la strato, komunikiĝadis kun scienculoj, legis verkojn de poetoj kaj filozofoj, diskutadis pri plej altaj demandoj sciencaj. Tio ĉi ja signifas, ke ŝi pasigis vivon malindan! Mi aŭdas ridon kaj aplaŭdojn por Hermipo en ĉiuj rifuĝejoj de malĉasto. Ĉar li ne kuraĝis starigi antaŭ vi plej forpuŝindan malĉastulinon kaj kulpigi ŝin, ĉar ŝi dirus al vi: tia estas mia okupo—kaj vi devus ŝin liberigi. Sed ĉu virino pensanta libere povas diri al juĝistaro: tia estas mia okupo? Neniel. Ĉar malĉasteco estas metio leĝigita, filozofio—ne. Hetero, kiu ruinigus la tutan grekan junularon — mokus ĉiujn juĝojn, dum filozofinon meditantan pri la deveno de steloj oni havas rajton kaj oni devas puni per morto laŭ postulo de iu ajn. En Atenoj estas pli sendanĝere dissemi infekton ol sciencon. Kvankam ne nur en Atenoj... Ĉiu popolo pistas la grandajn homojn, kiel nuksojn, por eligi el ili kernojn, per kiuj ĝi nutriĝas. Ne unu jam lumradio ekpafis el arestejaj mallumejoj, ne unu granda ideo estis oleita per martira sango. Kiam genio ekparolas al homaro, ĝi komence respondas per insulto kaj nur poste per beno. Malsaĝeco vagas tra vojoj jam pretaj kaj bone gardataj, la saĝeco trahakas al si vojon tra densa kaj maljuna arbaro, en kiu ĝin surfalas venenaj rampaĵoj kaj rabaj bestoj. La socio estas kreita por pigmeoj, grandeguloj vundas al si la fruntojn per ĝiaj malaltaj kunplektaĵoj. Por ke ili tamen ne difektu kaj ne disbatu tiun ĉi konstruaĵon, estas necese ilin faligi kaj senliberigi aŭ fortranĉi al ili la kapojn. Vi volas tion ĉi fari kun Aspazio. Ekkreskis en Atenoj virino — grandegulo, kiu ne enlokiĝas en tradiciaj ĉeletoj, kiu ilin dispuŝas kaj rompas, kiu super la nigra amaso leviĝas kiel palmo super arbetaĵo; dishaku ĝin aŭ fortranĉu al ĝi la pinton, se tion ĉi postulas Hermipo kaj permesas la leĝo. Sed ne pensu, ke via hakilo estas sankta, ĝi estas nur multepeza kaj akra. Se ĝin estus tenintaj generacioj, kiuj vivis antaŭ mil jaroj, ili faligus ĝin sendube sur viajn kolojn, ĉar vi estus por ili senpiaj kaj nemoralaj; se ĝin ekvidos en viaj manoj generacioj, kiuj vivos mil jarojn poste, ili nomos vin mortigantoj. La netuŝeblajn kredojn de niaj praavoj ni mokas hodiaŭ kaj niajn netuŝeblajn verojn la pranepoj ankaŭ ne indulgos. Ĉar apud niaj limaj kolonoj la mondo ne haltos en sia evolucio, sed ilin renversos, iros antaŭen kaj starigos al si novajn. Ĉu vi povas esti certaj, ke post vi finiĝas la progreso de l'homa ideo, ke tiuj principoj, pro kiuj vi kondamnas Aspazion, ne estos konfesataj de ĉiuj? Se via rigardo atingas la lastajn ekstremojn de l'monda ekzistado kaj antaŭvidas, ke via scienco, via kredo travivos ĉiujn ventegojn kaj ĉiujn kataklismojn en eterna senŝanĝemeco, forprenu al la edzo la edzinon, al la infanoj— la patrinon, kaj dediĉu ŝin kiel oferon al la dioj. Sed, se en vian konsciencon enŝteliĝis eĉ plej malgranda dubo, elaŭskultu ĝian averton por ke la mantelo de l'justeco ne kovru la krimon. La honesta koro donu al vi bonan inspiron, la hela prudento donu al vi saĝan konsilon, via verdikto estu voĉo de l'leĝo.

(Li malsupreniras de la parolejo, alproksimiĝas al Aspazio kaj kisas ŝin).

Kara edzino! Kalumniado nin disigis, sed la verdikto kunigos kaj falos sur nin ambaŭ.

Trad. D-ro Leono Zamenhof.

„Aspazio" ĵus eliris en Parizo, eldonita de la firmo Hachette & C-o.

Eĥoj el la kongreso.

Kunvenoj de slavaj esperantistoj.

Laŭ la listo de l' partoprenintoj ĉeestis 7 Rusoj, 32 Bohemoj, 16 Poloj kaj 1 Bulgaro.

Post la malfermo de l' kunveno aranĝita de la centra asocio de bohemaj Esperantistoj „Bohema Unio Esperantista", kies sekretario s-o Karel Procházka bonvenis la gastojn kaj klarigis signifon de tiu ĉi unua kongreso slava, estis elektita aklamacie kiel prezidanto de l' kunveno d-ro Andreo Fiŝer el Tiflis (Kaŭkazo), kiel protokolisto s-o Artur Adler el Lwów.

La debaton komencis s-o Procházka, proponante, ke Esperanto, ligilo tutmonda, estu uzata speciale kiel slava komunikilo kaj subtenante sian proponon per legado de tiatendenca artikolo, enhavita en „Časopis Českých Esperantistů" kaj precipe per la leteroj de d-ro Szczepan Mikołajski el Lwów, kuracisto kaj redaktoro de „Voĉo de kuracistoj". S-ro prezidanto resumas, ke la demando diskutota estas: 1. ĉu Slavoj bezonas lingvon komunan, 2. ĉu tiu ĉi lingvo devas esti iu el la slavaj aŭ Esperanto.

S-o inĝ. Evstiféieff (Ruso) en longedaŭra brila parolado argumentis, ke slava unuiĝo devas fondiĝi nur sur bazo de Esperanto. Li rakontas, ke ĉiuj slavaj popoloj estas jam reprezentataj en Esperantujo, kaj citas kiel ekzemplon, ke estas eldonita ankaŭ slovaka traduko de Zamenhofa Fundamento. Transirante al praktikaj rezolucioj li proponas 1. ke la slavaj Esperantistoj vizitu dum la kongreso loĝantan en Saksujo slavan popoleton de luzaciaj Serboj (akceptita); 2. ke oni fondu esperantan unuiĝon slavan kaj por tiu celo elektu aranĝan komitaton.

Unuvoĉe estis akceptita, ke la sole taŭga rimedo por slavaj interrilatoj estas Esperanto. S-o dr. Skałkowski proponas, ke aranĝon kaj pluan kondukadon de afero prenu sur sin Esperantistoj bohemaj, kiuj, estante en la tuta esperantistaro slava plej bone organizitaj kaj en la mondo esperantista proporcie plej multenombraj, disponas plej favorajn kondiĉojn de societa vivo. Per plimulto da voĉoj estas akceptita, ke la tuta kunveno komisias laborojn celantajn la unuiĝon de slavaj Esperantistoj al la „Bohema Unio Esperantista".

Laŭ propono de s-o prezidanto oni aklamacie decidas sendi gratulan telgramon al la grafo Tolstoj—plej fama samideano slava — okaze de okdeka datreveno de lia naskiĝo.

Sekvantan tagon kunvenis laŭ iniciato de B. U. E. kelke da ĉefaj slavaj propagandistoj por trakti pri la plej urĝaj preparaj laboroj. Estis decidite informi ĉiujn slavajn societojn pri rezultato de nia kunveno kaj peti redakciojn de slavaj gazetoj esperantaj pri afabla represo de tiu ĉi raporto. Ni ne dubas, ke ĉiuj redakcioj akceptos la proponon de s-o dr. Skałkowski, ke estu fondita slava gazeto, kies unuaj numeroj povus limiĝi je modesta bulteno kvarpaĝa eldonata en Praha kaj almetata al Časopis Českých Esperantistů, Pola Esperantisto, Espero, Lumo, Bulgara Esperantisto kaj Voĉo de Kuracistoj. Varme rekomendis la proponon precipe s-o Grabowski kaj s-o Charalambev, redaktoro de „Lumo".

B. U. E. insiste petas ĉiujn amikojn de nia ideo subteni per konsilo, kunlaborado, monoferado kaj abonado de nomita bulteno „Slava Esperantisto" ĝian komuninteresan agadon. Ĝi samtempe esprimas sinceran dankon al d-ro Skałkowski, kiu promesis en la nomo de l' societo esperantista en Lwów garantii la entreprenon per malavara monhelpo da 100 kronoj. Multiĝu similaj faktoj!

B. U. E. petas ĉiujn slavajn Esperantistojn, ke ili sendadu al ĝi adresojn de samideanoj izolitaj, t. e. loĝantaj en landoj slavaj ankoraŭ malmulte esperantigitaj, por ke la komitato de B. U. E. povu ekinterrilati kun ili.

(Laŭ Časopis českých Esperantistů).

Esperanto en la polico.

En la lasta tempo ĉiam pli kaj pli aliĝas al nia afero policistoj. Ni jam raportis en niaj antaŭaj numeroj pri la aliĝo al nia lingvo de policanoj en Francujo kaj Svedujo. Nun la movado inter policistoj disvastiĝas tre rapide en diversaj aliaj landoj. La skeptikuloj diros, ke tio ĉi tute ne montras ian fervoron aŭ simpation por nia ideo, sed ke ĝi nur estas simpla devo de polico, kiu volas kaj devas scii pri ĉio, kio okazas en iliaj regnoj. Ni opinias pri tiu ĉi afero iomete alie, sed se ĝi estus eĉ tiel, kiel pensas la skeptikuloj — ĝi montrus nur, ke nian movadon oni komencas serioze trakti en registaraj sferoj. Nun en Svedujo, Francujo kaj Germanujo fondiĝis specialaj grupoj. En Parizo aliĝis la konata policestro Bertillon. En la lasta tempo ankaŭ disvastiĝas nia lingvo inter la hungaraj policistoj. De la Septembro 1908 komencis eĉ aperadi en tiu ĉi lando speciala organo „Polica Revuo“ redaktata de S-ro A. Marich. S-ro kapitano Danielo Gegus, la konata policfaka scienculo, ankaŭ fariĝis nia fervora samideano. Sub lia redaktado aperas hungara polica fakrevuo „Közbiztonság“, kiu ĉiusemajne enmetas esperantan rubrikon.

La Drezdena kongreso kvazaŭ oficialigis Esperanton por la polico. Tie estis aranĝitaj specialaj kunvenoj policistaj, kie oni priparolis la propagandon de nia afero en sfero polica. Nun oni jam pretigas teknikan vortaron de la polica terminologio kaj precipe de la antropometrio sub la redaktado de nia samideano S-ro Miguère, la sekretario de S-ro Bertillon. La Drezdenaj kongresanoj havis la plej bonan okazon konvinkiĝi pri la progreso de nia lingvo inter tieaj policanoj, ĉar multaj el ili jam sufiĉe flue parolis esperante. Por tio ĉi ni devas speciale danki al D-ro Schramm, nia senlaca kvarano. Ni legas en la III numero de la „Bela Mondo“ sciigon, ke la policestro de Drezdeno intencas ordoni al la lokaj policanoj, kiuj portis verdan stelon sur la maniko dum la kongreso, porti ĝin de nun konstante.

La oficiala organo de esperantistoj—policanoj petas ĉiujn samideanojn afable alsendadi ĉiuspecajn sciigojn, bildojn k. t. p. pri policinteresaj aferoj, precipe bildojn de diversnaciaj polickostumoj. Adreso: Marich, Budapest IX, Ülloi — ut 59. IV. Baldaŭ aperos en Esperanto speciala verko pri la evolucio de la polica institucio.

Do Esperantistujo en tre proksima tempo havos siajn proprajn servistojn de la Sankta Hermandado!

La unuiĝo de dentkuracistoj-esperantistoj.

Inter aliaj metiaj unuiĝoj, kiuj organiziĝis dum la Drezdena kongreso, ni devas noti ankaŭ la unuiĝon de dentkuracistoj. Ĝis la lasta kongreso la dentkuracistoj ne formis apartan grupon, sed apartenis al la sekcio kuracista. Nun dank' al rapida disvastiĝo de Esperanto inter dentistoj, la lastaj decidis fondi sendependan sekcion. En siaj kunsidoj dum la kongreso Drezdena ili decidis aligi sian sekcion al la „Internacia Federacio de Dentkuracistoj“, sendi siajn delegitojn al la proksima kongreso de tiu ĉi federacio kaj peni pri la enkonduko de Esperanto, kiel ĝian oficialan kongreslingvon. Due, estis decidita ellabori specialan teknikan vortaron por dentologio. S-ro St. Essigman, varsovia dentkuracisto, kiu okupas sin pri tiu ĉi afero ĉe ni sciigas nin, ke baldaŭ fondiĝos laŭ la ekzemplo de l' kuracista sekcio en Varsovio ankaŭ sekcio de dentkuracistoj.

EL LA FILOZOFIO DE BESTOJ.

*La originalo pola verkita de Kl. — presita en Lvova ĵurnalo „**Vorto Pola**“.*

— Se mi havus flugilojn,—diris rano al najtingalo — mi vin nomus frato.

— Pardonu!—ekkriis muŝo al homo, enfalinte sur la fundon de lia vinglaseto— mi nur volis tie serĉi veron!

— Estas por mi tute indiferente, — diris hundo al la luno,—ke vi lumas sur min.

— Mi estas senpretendema — diris kato, — ĉar mi ne postulas lardon por kapti musojn.

— Vi ne ŝtelu!—admonadis maljuna rato junan, forprenante de ĝi pecon da fromaĝo.

— Nin oni pli ofte renkontas en kuirejo, ol vin, — diris blato al emancipantino.

— La homoj opinias sin ofendi reciproke, nomante unuj la aliajn azenoj. Ili forgesas, ke antaŭ ĉio ili ofendas nin per tio.

— Mi amas kanton de najtingalo — diris kato, — ĉar ĝi perfidas la lokon de ĝia estado.

— Jen estas cirklo trompiga — diris vermo al fiŝisto—min englutas fiŝo, fiŝon vi manĝas kaj vin — formordas mi.

— De kiam mi havas pensojn, kiujn mi volas kaŝi, mi ellernis paroli — monologis papago.

— Vi estas decide, nekompleta bruto—diris kun fiero bovo al ĉevalo. Vi vidas mem, ke vian viandon la homoj ne volonte manĝas; kiu el ni estas do pli nobla?

— Mi havas bonan koron — diris ansero—ĉar mi lasas min senplumigi de la homoj.

— Mi estas idealo de l' seriozeco — diris bovo — ĉar mi neniam ridas.

— Estas por mi tre flatante, — fanfaronadis kato—ke la homoj manĝas min ofte kvazaŭ leporon.

— Se mi vere estus alportanta infanojn sur la teron—argumentadis cikonio— ne ekzistus sur ĝi tiom da azenoj, vulpoj kaj bovoj.

— Duan fojon mi jam ne lasos min kapti — ĵuris fiŝo, kiam oni ĝin alportis en kuirejon.

— Kia bruego devenus — diris kokino — se mi iam ekkrius: — „Mi deziras, ke ĉiu vilaĝano havu dimanĉe Henrikon IV-an en sia poto“.—Tamen lin oni pro tio laŭdas, ke li nin destinis por poto!

— Pri mi — fanfaronis bovo — neniu povas almenaŭ diri, ke mi apartenas al senkornaĵuloj.

— Se mi ne scius rampi jam de mia naskiĝo — diris serpento — mi ĝin lernus de l'homoj.

— Kial vi tiel rapidas? — demandis limako rapidkurantan leporon — ĉu vi timas tro malfruiĝi? Ĉiuj viaj vojoj kondukas ja al kuirejo.

— Jen kantisto kaj kune heroo! — ekkriis rano, ekvidinte sin en spegulo.

— Laŭ vi, homoj — diris hundino — estas hundo simbolo de fideleco. Pri tio vi min demandu...

— Mi ne scias—diris bovo al vegetaristo — ĉu kreskaĵa nutrado estas por vi bona, sed por mi, ĝi estas decide, tre konvena.

— La homoj do kantas ankaŭ en kaĝo! — ekkriis kanario, enfluginte foje en vestiblon de teatro, kie oni ludis operon.

Esp. Helena Hempel.

MALGAJA KANTETO.

Ho, ne por vi de l' kantoj miaj
malgaja ton',
Vi ne komprenos koron prematan
de dorna kron'.
Sunaj radioj teksu kanteton
oran por vi:
Pri la ĉielo, floroj spirantaj,
am', iluzi'.—

Kantetoj miaj—plenaj je plor',
dolor', sopir';
Sen cel', senvoja, sola, malĝoja
mia forir'.
Foriras mi kun kor' vundita,
sanganta kor'.
En tomb' nur lasos min la dolora
pri vi memor'!

M. Czerwiński.

FABLO
DE ALEKSANDRO FREDRO
(el la komedio: „Sinjoro Jovialski").

— „Pardonu, ho sinjoro, mian mallertecon",
Diris ekzekutisto al kondamnitulo;
— „Ĉar hodiaŭ unuafoje pendigonte,
Mi en tiu metio estas noviculo".

— „Vi ne ĝenu vin tute, mi petas, sinjoro",
La ĝentila fripono respondis malĝoje;
— „Mi, vian mallertecon ne povos rimarki,
Estante pendigota nur unuafoje".

Esp. Helena Hempel.

HUMORAĴOJ.

Altartista verkaĵo.

Profanulo (en pentrista laborejo). Kion prezentas tiu ĉi stranga pentraĵo?

Artisto. La trairon de l' Izraelidoj tra la Ruĝa maro.

Profanulo. Kie do estas la maro?

Artisto. Ĝi ĵus disiĝis.

Profanulo. Kaj la Izraelidoj?

Artisto. Ili antaŭmomente forpasis.

Profanulo. Sed almenaŭ la Egiptanoj?...

Artisto. Ili estas baldaŭ alvenontaj.

Eltiraĵoj el leteroj.

1) El letero de filozofprofesoro al lia edzino.

...Kaj ankaŭ mi vin petas: sendu al mi viajn pantoflojn. Verdire, ne estas al mi necesaj viaj pantofloj, nur la miaj, sed se mi skribus: miajn pantoflojn, vi pensus distrite, ke mi petis pri viaj pantofloj. Tial mi skribas: viajn pantoflojn, por ke legante: viajn pantoflojn, vi komprenu, ke ĝi signifas: miajn pantoflojn, kaj ke vi alsendu miajn pantoflojn, sed ne viajn.

2) El letero de poeto al lia fianĉino.

...Mi sendas al vi samtempe, el Romo, mian lastan fotografaĵon. Mi lasis min fotografi apud Apollo belvedera. Tiu maldekstre staranta estas Apollo...

H.

Ĉu li?

ORIGINALA ESPERANTA ROMANO

de D-ro Vallienne.

Kompreneble mi preferus, ke la unua *) romano esperanta, kiun mi legis, estu majstroverko!

Sed mi tute ne intencas plendi kontraŭ la novenaskitaj Muzoj de konstruota esperanta Olimpo, ke tiu ĉi romano esperanta ne estas majstroverko, ke ĝi estas nur... „Ĉu li?" de sinjoro D-ro Vallienne.

Mi eĉ diros, kompreneble... sub granda sekreto, al miaj amikoj esperantaj, ke ekzistas sub la suno majstroverkoj, iom malfacile legeblaj; estas majstroverkoj, ĉe kiuj ordinara leganto tre bone endormiĝas; estas majstroverkoj neniam tralegotaj ĝis la fino, tre multe laŭdataj en historioj de literaturo kaj konataj nur al profesoroj de literaturoj.

Duaflanke, mi tute konsentas kun la fama Voltaire, ke ĉiuj specoj de literaturo estas bonaj, se ili ne estas enuigaj. Juĝante laŭ tiu mezurilo, oni devas ĝojege anonci al la mondo esperantista, ke „Ĉu li" apartenas al speco de literaturo tre malenuiga. Jen esperantistoj ricevis 447-paĝan romanon, kiun oni legas kun granda intereso de la komenco ĝis la fino, ĉar sinjoro Vallienne estas antaŭ ĉio perfekta, sprita kaj amuza rakontisto.

Kaj tio ĉi sola estas jam grava kaj sufiĉa kaŭzo, por ke ni danku la unuan stelon, kiu aperis sur la ĉielo de l' estonta originala literaturo esperantista.

Jes, ĝi estas vere..., romano „Ĉu li?" apartenas al tiu arto literatura, kiun la Germanoj nomas: „Raŭbergeschichte„ (Rabistaj rakontoj). En tiuspecaj verkoj homoj mirinde neniam mortas antaŭ, ol ili eldiras la tutan grandan monologon, kiu estas bezona al la aŭtoro, kaj neniam vivas tiel longe, ke ili havu tempoń elparoli gravan vorton, klarigantan la misteron, kiu estas bezona por la lastaj 400 paĝoj de l' romano. En tiuj verkoj ĉiu paŝo de herooj kondukas ilin sur novan vojon, kaj estas mil da tiuj vojoj, kaj ĉiu vojo estas kovrita de nova mallumo de misteroj, kaj la manoj de l' aŭtoro teksas kun miriga lerteco la misterajn fadenojn—nur ĉiam estas unu vojo, sur kiun plej lertaj herooj ne povas trafi: ĝi estas... rekta vojo. Sed... filozofoj jam de longe diras, ke rekta vojo estas tiu, sur kiun plej malfrue eniras la homaro. Kaj ĝi estas plej bona defendo por la aŭtoroj de tiaj romanoj. Kiel ne akcepti malgrandan malveraĵon en komenco, se danke al ĝi oni legas mil interesajn komplikaĵojn?

Mi estis tute kontenta, ke mi ekkonis en sinjoro Vallienne samlandanon de sinjoroj Gaboriau, Sue, Montepin, kiuj havis talenton eltrovi okazintaĵojn, terure amuzantajn kaj alforĝantajn leganton al ilia verko ĝis avide atendata fino.

Kaj oni ne havas rajton diri, ke en la verko de sinjoro Vallienne mankas tute psikologio. Ne! imagu nur sinjoroj, ke okazis en pleneco tiu stranga fakto, pri kiu parolas s-ro Vallienne (kaj li argumentis laŭscience kaj laŭ realeco eblecon de similaj fenomenoj naturaj)—kaj nun demandu, kion en tia stato sentos la homoj? Mi devas konfesi, ke malfacilan enigmon de l' psikologio en tiaj eksterordinaraj kondiĉoj s-ro Vallienne divenas kun ebla versimileco. Mi almenaŭ ne povis kontraŭbatali mian kompaton por la suferoj de Beatriĉo, Regino, Fernando, Petro... tiel ĉarme la aŭtoro pentris iliajn korojn...

Vere, mi iafoje devis rideti ĉe la larmoj de la heroinoj, sed unue — la rido tute ne esceptas kompaton, kaj due... mi ne estis kulpa, ke la spriteco del' aŭtoro elvokas antaŭ ĉio grandan kontentecon en la leganto.

Ĉar d-ro Vallienne estas tre sprita... Nur kun lia spriteco oni havas rajton post *„La komedio de eraroj"* de Shakespeare skribi verkon je la sama temo, sed laŭ tute nova maniero. La aŭtoro de „Ĉu li?" skribis *„tragedion de eraroj"*...

Plu mi ne volas diri... Mi intence nenion skribis pri la okazintaĵoj en la romano. Ĉar rakonti la enhavon — estus granda perfido kontraŭ la planoj de l' aŭtoro. Mi ne volas malkovri sekretojn de l' romano. Ĉiu legu ĉi tiun libron — se li povas, ploru kun la heroinoj... En ĉiu okazo li estos vere amuzita.

Leo Belmont.

*) La unua granda origala romano esperanta estis „Kastelo de Prelongo" de tiu ĉi sama aŭtoro. Bedaŭrinde mi ankoraŭ ne havis eblon ĝin tralegi.

Kronika. — Kroniko.

Ruch esperancki w Polsce.

W ostatnim numerze wykazaliśmy, że ruch esperancki u nas w kraju postępuje szybko naprzód. Wymieniliśmy cały szereg kursów i szkół, które zaprowadziły systematyczne wykłady języka Esperanto, dziś możemy tylko zaznaczyć, że wykłady te odbywają się bardzo pomyślnie

Pola esperantista movado.

En la lasta numero ni montris, ke la esperantista movado en nia lando iras rapide antaŭen. Ni notis grandan nombron da kursoj kaj lernejoj, kiuj enkondukis ĉe ni sistemajn lecionojn de Esperanto; hodiaŭ ni povas aldoni, ke tiuj ĉi lecionoj progresas tre bone kaj la nombro de iliaj

wobec coraz więcej wzrastającej liczby słuchaczów. Z nowych przejawów ruchu naszego z ostatniego miesiąca zasługuje przedewszystkim na zaznaczenie utworzenie specjalnej sekcji lekarskiej przy warszawskim towarzystwie esperantystów, która odbyła dnia 26 września pierwsze organizacyjne zebranie, na którym było uchwalone przyłączyć się do Wszechświatowego Związku Lekarzy Esperantystów oraz popierać w dalszym ciągu organ lekarski wychodzący we Lwowie—„Voĉo de kuracistoj" (Głos lekarzy). Wogóle propaganda Esperanta wśród lekarzy polskich postępuje szybko naprzód.

Drugim faktem, godnym zaznaczenia — jest nasza pierwsza wystawa esperancka w kraju. Niestety, pisma polskie uważały sobie za obowiązek zamilczeć o niej zupełnie. Dla tego też zapewne nie wielu esperantvstów słyszało o tym, że w Łukowie na ostatniej wystawie rolniczej dzięki zabiegliwości miejscowych esperantystów, był urządzony oddział esperancki. Organizatorom jego należy się podziękowanie za bardzo staranne i umiejętne urządzenie tej pierwszej esperanckiej wystawy w kraju.

Od p. Klimeckiego, jednego z organizatorów, otrzymaliśmy następujące sprawozdanie.

„Na wystawie rolniczej w Łukowie staraniem miejscowych esperantystów: p-i K. Klimeckiej i p. W. Sikorskiego był urządzony oddział esperancki. Tłómaczenia esperanckie arcydzieł literatury powszechnej i polskiej były nader licznie reprezentowane, sporo również było cenników, katalogów i cyrkularzy handlowych, oraz przewodników turystycznych i innych podobnych wydawnictw, świadczących o praktycznym zastosowaniu języka Esperanto. Okazale się przedstawiała kolekcja czasopism esperanckich propagacyjnych i specjalnych, wychodzących w różnych częściach globu ziemskiego. Nie brak także było map gieograficznych, informujących o rozpowszechnieniu się Esperanta i o liczebności esperantystów. Miejscowi esperantyści, kolejno dyżurując przy kiosku, sprzedawali wydawnictwa esperanckie oraz udzielali informacji zwiedzającym. Zainteresowanie ze strony zwiedzających było dość duże, jednak pomimo to korespondenci prawie wszystkich codziennych gazet nie uważali za właściwe nawet wzmiankować o istnieniu kiosku esperanckiego. Urządzanie działów esperanckich podczas rozmaitych wystaw ma wielkie znaczenie dla propagandy. Środek ten oddawna jest stosowany z powodzeniem zagranicą. Pierwszy krok u nas w tym kierunku zrobili esperantyści—łukowianie, inni polscy esperantyści również nie powinni zaniedbywać nadarzających się sposobności. Ten środek propagandy ma obecnie u nas tym większe znaczenie wobec dość częstych wystaw w kraju".

